

Germana Kongreso en Hameleno

Pli ol 170 homoj partoprenis en la 92a Germana Esperanto-Kongreso, kiu okazis dum pentekosto en Hameleno, proksime de Hanovro. Multaj venis el Germanio, sed estis gastoj el deko da aliaj landoj, tiel ke Esperanto nature estis ofte uzata lingvo.

Impresa estis la granda zorgo, kiun la lokaj organizantoj sub gvido de Heinz-Wilhelm Sprick donis al la kongreso. Okazis kvar koncertoj, de JoMo el la tuluza regiono, *Asorti* el Litovio, *ĴeLe* (Ĵenja kaj Lena el Germanio) kaj la nova impresa talento Kaŝi (el Hamburgo). Kaj prezentis teatraĵon pri la legenda figuro Münchhausen la sperta pupludisto Christoph Frank. La kulturalan programon malavare subvenciis la regiona ŝparkaso, al kiu ni ŝuldas grandan dankon.

Por meriti la kulturalan oferton la kongresanoj kompreneble ankaŭ sekvis prelegojn kaj laborgrupojn pri diversaj temoj. Okazis prelegoj ĉirkaŭ la temo de fabeloj kaj legendoj — ja Hameleno vaste konatiĝis kiel urbo de la legenda ratkaptisto, kiu post nericevo de honorario forkondukis el la urbo centon da infanoj, kiuj neniam plu revenis. Do eblis aŭdi pri ĉi tiu legendo, pri la fabelkolektintaj fratoj Grimm, pri la celgrupo por fabeloj (fakte origine plenkreskuloj, ne infanoj), pri kiel rakonti bele, pri rumaniaj legendoj inkluzive de la vampiro Dracula kaj pri la vivo kaj verkoj de la fabelkreinto Hans-Christian Andersen.

Aliaj prelegoj temis pri Koreio, japanaj ĝardenoj, korea natura medicino, Kubo, la 'ne'funkciado de Belgio kaj interkulturaj miskomprenoj. Montriĝis bildoj el la kosmo, prezentiĝis la politiko de la verduloj, Esperanto-projektoj en interreto, podkasto kiel alia formo de

radio kaj oni lernis pri la 111 jaroj de Esperanto-asocio en Berlino (kaj libroprojekto tiutema). Instruado estis temo de pluraj prezentoj — temis pri kantado kiel malstreĉaĵo en Esperanto-kursoj, pri rektmetodaj kursoj kaj lernado de Esperanto-vortoj per Android-poŝtelefono. Okazis konversacia rondo en latina lingvo kaj eblis iom lerni kiel pentri. Esperanto-laboro estis temo ĉe pluraj prezentoj de la Esperanto-urbo Herzberg, same en trejnado pri gazetaraj rilatoj, en prelego pri la kaŭzoj, kial Eo ne disvastiĝis pli multe, kaj en kunsido pri nia estonteco: Esperanto — kien nun?

Okazis ankaŭ la jarĉefkunvenoj de Germana Esperanto-Asocio kaj de diversaj fakaj kaj regionaj organizaĵoj. Eblis partopreni en plurlingva surplaca diservo en la urbo kaj okazis propra ekukena diservo en Esperanto.

La lokaj organizantoj zorge flegis rilatojn al politikistoj, pro kio venis pluraj salutoj, ankaŭ de la ministro-prezidanto de la federacia lando Malsupra Saksio. La urbestro invitis kvindek da kongresanoj al solena akcepto kaj vizitis nin vespere por persone saluti ĉiujn kongresanojn, kune kun la distriktestro.

La junularo ofertis paralele semajnfinan lingvo-kurson KEKSO (Kreema Esperanto-KurSO). Kaj kompreneble ili ĝuis la semajnfinojn ankaŭ ekster la kurso.

Bone funkciis la gazetaraj rilatoj. Aperis pluraj artikoloj en lokaj gazetoj kaj pliaj en gazetoj de Bremeno kaj Kolonjo. Raportis la okcidentgermana radio el Kolonjo kaj la televido de Malsupra Saksio.

Venontjare la Germana Esperanto-kongreso okazos en Munkeno; ni ĝojos vidi multajn eksterlandajn gastojn.

Lu Wunsch-Rolshoven

Ĝemeliĝo: Ĉamberio-Torino

Ĉamberio (200 000 loĝantoj ene kaj ĉirkaŭe) el Francio kaj Torino (900 000 loĝantoj) el Italio ĝemeliĝis antaŭ pli ol 50 jaroj. La du urboj apudas la francajn kaj italajn Alpojn.

Kontaktoj inter la esperantistoj el ambaŭ urboj certe jam ekzistis, kaj en 2014 la ĉamberianoj el la loka asocio Esperanto Vive decidis vivigi la ĝemeliĝon, kaj kontaktiĝis kun la torinanoj el Centro Esperanto Torino. La italoj invitis la francojn okaze de Zamenhofa festo en Torino.

En majo 2015 la ĉamberianoj siavice invitis la torinanojn, kaj dekkvino da ili venis. Ni akceptis ilin la 23an de majo, sabate, en la Muzeo pri Belarto. Ni vizitis ekspozicion pri la reĝoj kaj la mecenatoj en la komenco de la 18a jarcento dum rokoka periodo en Torino. Gvidisto prezentis ĝin al ni france kaj ĉamberianoj esperantigis la klarigojn.

Ni poste aŭskultis bonvenigan paroladon fare de la urbestro, kiun esperantigis francaj kaj italaj esperantistoj, kaj ĝuis bonajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

Post manĝo, la urbestro proponis profesian viziton tra la urbo en la itala. Kelkaj savojaj Esperantistoj kuniris la torinanojn. Vespere ĉiuj gustumis manĝaĵojn, kiujn preparis lokaj esperantistoj, antaŭ ĉeesti trilingvan koncerton en la franca, itala kaj Esperanta. Multaj konataj kanzonoj eksonis tra la festa ĉambro. La ĉeestantoj povis pli bone kompreni la paroladon kaj eĉ kanti danke al ekrano, kiu montris la kantatajn tekstojn. La plej kantata kantisto estis certe Georges Brassens.

Dimanĉe kelkaj vizitis la skvaron Zamenhof en Ĉamberio kaj la arbon de Esperanto en urba parko. Tagmeze ni kunmanĝis en loka restoracio, kiu *La galette* (La galetto).

Kompreneble ne aperis en ĉi tiu simpla rakonteto la plej grava kaj ĝojinda: la varma etoso kaj la viglaj babiladoj inter la ĉeestintoj, malgraŭ iliaj deven-, aĝ-, opini- malsimilecoj. Ĉiu el ni jam atendas senpacience trovi niajn amikojn el Torino okaze de novaj kaj fruktodonaj renkontiĝoj.

Cetere, la esperantistaj asocioj el Ĉamberio kaj Torino estas invitataj de la Torina kaj Ĉamberia urbestroj por ĉeesti en Torino oficialan kunvenon de ambaŭ urbestroj, kun la celo subskribi pliajn interkonsentojn pri gemeliĝo.

Nelli Darbois

Enkonduko en Esperanto al la ratkaptista ludo (Foto: Franz Kruse)





Post SES-10 en Slovakio iru al UK-100 en Francio!



La eldonanto de *La Ondo de Esperanto* Halina Gorecka partoprenos la jubilean Universalan Kongreson en Lillo. En la Movada Foiro, kiu okazos en la unua kongresa tago (sabate), kaj dum la tuta kongreso ŝi akceptos abonkotizojn por *La Ondo* je speciala jubilea tarifo.



Italio-Francio. La esperantistaj grupoj de la ĝemelurboj Ĉamberio (Francio) kaj Torino (Italio) lastatempe aliĝis al la ĝemeliĝo: je la Zamenhofa Tago ĉamberianoj vizitis Torinon, kaj en majo torinanoj venis al Ĉamberio (vd. p. 8) por kune kun la gastigantoj ĝui interesan programon. (Nelli Darbois)



Litovio. En la oka Litovia Ĵurnalista Esperantista Seminario, la prezidanto de la Tutmonda Ĵurnalista Esperantista Asocio, Audrys Antanaitis (li staras kun la standardo apud Vytautas Ŝilas kaj Kazys Svidenis), estis proklamita Ĵurnalista Etalono 2015 en Litovio. (Vytautas Ŝilas / Jūratė Pauliūtė)



Ukrainio. En majo la gvidantaro de la Ukraina Esperanto-Asocio okazigis informkampanjon *Bukovina Printempo* en Ĉernivci (vd. p. 10). Kadre de la kampanjo la prezidanto de UkrEA Eŭheno Kovtonjuk dum 26 minutoj “vive” parolis pri Esperanto en la televido *Ĉerniveckij promin.* (E. K.)